# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado


## Enhavo


- EKO atingas la kvindekon!
- EKO, rekreskante grava servo!
- AMO 68 – Eo-Centroj, ekis
- Regiona agado dum la pandemio
- KER ekzamenoj atingas Afrikon



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.



*EKO 2020-50 sendita el Budapeŝto, la 29an de oktobro*


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*



Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Jubilea EKO-komunikaro

Por 2020 ni kontraŭatende sendis preskaŭ rekordan nombron de komunikoj. Tion kaŭzis la pli granda bezono por novaĵoj kaj informoj pri landaj kaj fakaj agadoj, kiuj devas virtuale okazi. Okaze de la 50-a komuniko de 2020, ni post multa refosado, prezentas la imponan 7-jaran historion de la komunikilo:

2013: naskiĝo. Du komunikoj, ambaŭ pro la tiam lanĉita AMO-programo.

2014: 20 sendoj antaŭ la kongresoj, 15 dume (AR), 17 poste, sume 52.

2015: 25 antaŭ la kongresoj, 13 dume (Lillo, FR), 14 poste. Sume: 52

2016: 20 antaŭ la kongresoj, 3 dume (Nitra, SK), 17 poste. Sume: 40.

2017: 16 antaŭ la kongresoj, 5 dume (Seulo, Busan KR), 15 poste. Sume: 36.

2018: 20 antaŭ la kongresoj, 0 dume (Lisbono PT), 5 poste. Sume: 25.


2019: 10 antaŭ la kongresoj, 0 dume (Lahti, FI), 7 poste. Sume: 17.

2020: 39 antaŭ la kongresoj, 0 dume (virtuala UK), 11 poste. Sume ĝis nun: 50.

## Sume 274 komunikoj depost julio 2013 tra 7 jaroj: averaĝe 39 komunikoj jare.

Klare, la skalo de la komunikoj faladis tra la lastaj jaroj, kaj la intenco de la laciĝinta pretiginto estis, ke tiu moderigo pluiru. Sed alvenis la pandemio kun aliaj planoj. Sekve la komunikoj en 2020 sendube atingos rekordan intensecon; la izoloĝo kreis unikan soron de la nombro da agadaj projektoj kaj alvokoj. Tipe (kiel nun), alvenis sufiĉaj kandidataj tekstoj por plenigi la tri sekvajn komunikojn.

La subkaŝanta filozofio de la komunikoj estas la bezono kaj graveco de loka, landa kaj regiona agado, kaj la eksterproporcia kontribuo de motivitaj unuopuloj.






La jara sumo de EKO-komunikoj 2013-2020. La ruĝa linio indikas la planitan sorton por la komunikoj. Tamen, sekvis virus-spronita kreskego, kiu daŭros ĝis kredeble sepdeko da komunikoj.

# Esperanto-Centroj centre en la atento

La temo de la 68-a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) estis 'La rolo de Esperanto-Centroj. Tiu elekto estis trafa, ĉar la seminario okazis kadre de la aŭtuna sesio de la kulturcentro Greziljono, loko kun preskaŭ 70-jara historio, kiu ludis gravegan rolon en la kuntiro de esperantistoj, precipe en la postmilitaj jaroj. La teknika prizorgo kiel ofte por AMO-seminarioj, estis perfekte plenumita de la irana landa asocio IREA.

Post 10-minuta enkonduko de la patro de AMO, kiun ni resumos en posta komuniko, sekvis tri bonkvalitaj prezentaĵoj.

- Lee Jungkee, pri la Eo-Centro en Seulo, Koreio (prezentaĵo alkroĉita)
- Zsofia Korody pri la Centro en la Eo-urbo, Herzberg am Harz, Germanio.
- Małgosia Komarnicka pri la Interkultura Centro en Wroclaw, Pollando (prezentaĵo sekvos).



Kurso en la Eo-Centro en Seulo gvidata de Dennis Keefe.

Mi havas ĉiujn el la tri prezentaĵoj en la formato PDF, sed mi nun sendas nur unu, la dua sekvos kun posta komuniko. La tria prezentaĵo pri Herzberg tro pezas por EKO – por kio mia

limo estas 1 MB (escepte 2). Kiu deziras ricevi ĝin (9MB eĉ post sveltigo), povas ĝin peti de mi.

Morgaŭ okazos la dua parto de la seminario kun kontribuoj pri la Eo-Centroj en Rumonge, Burundo kaj Geziljono en Francio. Fine okazos diskutado pri la demandoj por eniri enketilon por finfine havi ekvilibran bildon pri niaj tre diverstipaj centroj.

Patro SMG, okt 28

## KER-ekzamenoj unuafoje en Afriko

La organizanto de la unua afrika sesio estas Scio Sen Bariloj, SSB. La sesio okazos sabate la 28-an de novembro 2020 en JoCa (centre en Kotonuo). La komenco estos je la 9-a horo matene. Vi povas kandidatiĝi por la niveloj B1 aŭ B2 aŭ C1. Okazos nur la skriba parto. Por elekti vian nivelon, rigardu jenajn dokumentojn, kiujn mi sendas al vi; temas pri paĝoj el la KER-libro laŭ kiu vi povas taksi vian nivelon. La kompletan dokumenton vi povas trovi ĉi tie : https://edukado.net/ekzamenoj/referenckadro

Mirejo Grosjean el Kotonuo, parto de mesaĝo al potencialaj kandidatoj



Potencialaj kandidatoj por la ekzamenoj de UEA.

====== Vortoj: 585 =======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/49. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.